

NIA VOĈO
Madrida Esperanto-Liceo

San Alejandro 6-4^B-Ext. 28005 Madrid
(Nur poŝta adreso)

Ni kunvenas lunde je la 18,30 en Rodríguez San Pedro 13-3^o-7

Redaktas kaj eraras: Lupe Sanz

NOVIEMBRO 2003

BAZA KURSO EN MADRIDO

Juan del Castillo gvidos kurson (4 monatoj) en Asociación de Vecinos "La Unidad" de San Cristóbal de los Ángeles, (Villaverde). Rocafort, 5. Tfn: 91 798 40 91 / 666 966 309.

Horaro: L kaj X, de 19'00 ĝis 20'00. M de 19'30 ĝis 20'30.

CENTJARIĜO DE LA ESPERANTO-MOVADO EN HISPANIO

La jaron 1903 fondiĝas Hispana Societo por Propagando de Esperanto (HSpPE), la unua tuthispania asocio kies celo estas la disvastigo kaj propagando de la internacia lingvo. Ni festas do dum tiu ĉi jaro 2003 la centjaran datrevenon de la organizita Esperanto-movado en Hispanio.

Tiu ĉi datreveno fariĝas okazo por agado de la esperantistaj asocioj en Hispanio, kun la celo diskonigi la movadon en eksteraj medioj, ĉefe ĵurnalistaj kaj historiaj. La Ĝenerala Asembleo de HEF aprobis agadplanon por kunmemori tiun ĉi okazon dum la periodo julio 2003-junio 2004. Se vi deziras legi la tutan agadplanon, kaj kunlabori en ties plenumiĝo, petu ĝin al la oficejo de HEF, al MEL, aŭ rekte al Toño del Barrio (tonyodelbarrio@teleline.es) kiu kunordigos la agadon.

Inter la proponitaj agadoj troviĝas: amaskomunikila informado, diskonigo interne de la movado, publikaj prezentoj kaj rilato kun institucioj kaj publikaj instancoj.

En la Plano ni ankaŭ konsideras la feliĉan cirkonstancon ke jam publikiĝis la Granda Vortaro Hispana-Esperanto, kio multe povas helpi en publikaj prezentadoj kaj ekstera informado ĝenerale. Fakte, unu el la unuaj planitaj aktoj estas la publika prezentado de la Granda Vortaro, en publika institucio de Madrido, akompanata de prelego pri la historia kunmemoro, pri kio ne oportune informos vin.

Madrida Esperanto-Liceo studas la eblecon por eldoni libron pri esperanto, verkita de Antonio Valén en la hispana.

RECENZO (Andrés Martín en "Gazeto Andaluzio")

Gran Diccionario Español-Esperanto, de Fernando de Diego. 24,8 cm x 15,5 cm, Unua eldono, 1.277 paĝoj. Eldonis MGA. Presis Coop. de Artes Gráficas Librería General, Zaragoza, Hispanio. 55 euroj

Ni troviĝas antaŭ impona verko delonge atendita de la hispana esperantistaro kaj finfine presita. Bedaŭrinde, kaj samtempe ĝojinde, la de ĝis nun uzitaj hispanesperantaj vortaroj iĝis nesufiĉaj pro la evoluo de la lingvoj koncernataj ĉar, bonŝance, tiel esperanto kiel la hispana lingvo vivas. Tutcerte Lexicón Sopena Esperanto-Español y Español-Esperanto de J. Paluzie-Borrell kaj Vocabulario Español-Esperanto de E. Tudela Flores dum multaj jaroj utilis kaj utilos kiel poŝvortaroj, tamen Gran Diccionario Español-Esperanto de nun estas la plej

kompleta el la hispanesperantaj vortaroj kaj nepre konsultenda okaze de lingvaj problemoj.

Mi kunsentas kun Fernando de Diego kiam li eldiras en la prefaco de la verko "la razón de este diccionario se basa en la necesidad de remediar la poca consistencia lexicográfica y la pobreza lexicológica de los vocabularios de español-esperanto que se fueron publicando a lo largo del pasado siglo" (la ekzisto-pravo de ĉi tiu vortaro baziĝas sur la neceso meti finon al la malgranda konsisto leksikografia kaj la povreco leksikologia de la hispanesperantaj vortaroj eldonitaj en la pasinta jarcento).

En Gran Diccionario Español-Esperanto valoras: la nombro da kap-vortoj (50.750), la indikoj por uzi ĝuste la verkon, la nombro da signifoj, la enkonduko de neologismoj, la bibliografio proponita, la mallongigoj (80), la paĝaro, la ĉeesto de vortoj kaj dirmanieroj propraj al la hispana lingvo parolata en la hispana Ameriko, la presado kaj la facila manuzado. Ĉio danke al la penado de la aŭtoro kaj ties teamo de kunlaborantoj. Mi gratulas ĉiujn.

Komprenoble, ĉio perfektigeblas. Tiusence mi nepretendeme atentigas pri la jeno:

1. mankas vortoj troveblaj de antaŭlonge en aliaj vortaroj, ekz. **San Sebastián** (aperas Donostia sed ne San Sebastián), **Se-chuan, Jarbin...**;
2. malabundas gravaj geografiaj nomoj hispanaj;
3. neniam oni mencias la antonimojn malgraŭ ke la uzo de la antonimoj faciligas la paroladon;
4. aperas kapvortoj kiel ITALIANIZAR, HELENIZAR, GERMANIZAR, ESPAÑOLIZAR, kial ne ESPERANTIZAR kaj la responda ESPERANTIGI ?
5. Mankas bildoj klarigantaj tekstojn, ekz. pri homa anatomio, veturiloj, flaŭro, faŭno... kvankam la bildoj utilegas al la kompreno kaj memorigo de la vortoj;
6. Ŝajne oni preferas esperantigi la vortojn kalkulante nur malfacilecon prononci ilin fare de personoj kies denaska lingvo ne estas la hispana. Mi opinias, ke oni eraras grave forgesante la similecon de la fonemoj. Tiurilate mi subtenas Valjadolido anstataŭ Valladolido, Seviljo anstataŭ Sevilo...

VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO

La kunvenoj de MEL okazas ĉiulunde je 18.30 en str. Rodríguez San Pedro, 13, 3º, 7

17-a novembro 19,00 h "La romanika kaj gotika arto en Francio" Lumbildoj de Carmen Suárez

15-a decembro 19,00 h "Turismadi en esperanto" lumbildoj de Angelita Sanz.

SATEH

Ni jam informis ke dum la lasta kongreso de SAT (Alikanto-2002), grupo da samideanoj decidis formi novan organizitan strukturon celantan kunordigi la personojn loĝantajn en Hispanio, kiuj membras en aŭ sin sentas proksimaj al SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda). La nomo de la grupo estas "Asocio Izquierda y

Esperanto-SATEH (SAT-en-Hispanio)". La ĉefa celo estas la informado pri esperanto en laboristaj medioj, kunordigado de agadoj en medioj proksimaj al la ideoj de SAT, apogo al tiu ĉi organizaĵo inter la hispana esperantistaro.

En Septembro oni eldonis informan flugfolion laŭ la nomo "Informilo" kiun oni povas legi en la adreso www.satenhispanio.eresmas.com. La asocio havas jenan poŝtan adreson: Asociación Izquierda y Esperanto. SATEH. Apdo. 8537. Madrid. Satenhispanio@eresmas.com

La budo pri Esperanto kiun aranĝis "IZQUIERDA Y ESPERANTO SATEH" en la festo de la komunista partio (La Fiesta del PCE), estis tre vizitita kaj multaj demandis pri nia lingvo, kiun ili konsideris malaperinta.

ESPERANTO ALILOKE

Ekde septembro, ĝis Kristnasko, Augusto Casquero restos en la urbo Bydgoszcz (Pollando) kie li instruos Esperanton kaj hispanan lingvon (en Esperanto) ĉe la Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo.

.....

ESPERANTO LICEO DE MADRID

San Alejandro 6-4^oB. Ext

28005 Madrid

Asociación de Utilidad Pública Municipal